

Raporto pri vojaĝo por disvastigi Esperanton en Saĥaleno

YOKOYAMA Hiroyuki, ano de Hokkajda Esperanto-Ligo

De la 10-a ĝis la 17-a de aŭgusto mi venis al la urbo Jujno-Saĥalinsk en la insulo Saĥaleno, Rusio, por disvastigi Esperanton kun miaj kamaradoj.

http://www.hokkajda-esp-ligo.jp/jp/sahxaleno/sahxaleno_esp.htm

De la 11-a ĝis la 14-a ni disdonis la flugfoliojn pri nia parolado kaj kurso. Mi diris, “Это Пожалуйста. (Ето Pozhaluysta.) – Bonvolu ĝin.” sur la strato. Kaj multaj rusaj vojirantoj jen ĝentile legis ĝin jen diris, "Спасибо. (Spasibo.) - Dankon." Multaj Saĥalenoj estas afablaj kaj ĝentilaj laŭ mia sento.

De miaj 14 kamaradoj el Japanio oni agrable ricevis la flugfoliojn sur la strato, tial mi estis ĝoja. Ĉirkaŭ 80 procentoj de la renkontitoj sur la strato estis tiaj. En Hokkajdo mi ne spertis tion. Ni disdonis ĉirkaŭ 400 flugfoliojn.

En la 15-a de aŭgusto troviĝis 20 rusaj partoprenintoj en nia kunsido. Mi surpriziĝis, ke estis 20 partoprenintoj. Mi ne spertis tion ĝis tiam. S-ro Aleksandro de Rusia Esperantista Unio (REU) diris, “20 personoj estas tre bona rezulto. Eĉ en mia urbo, pli granda ol Jujno-Saĥalinsk, kutime venas malpli da homoj, ekzemple, en E-aj kursoj estis 10-12 homoj dekomence. Do mi vin gratulas pro sukceso!”

Vidu jenan paĝon pri la parolado de s-ro Hoŝida. Laste li diris la resumon Esperante. En la kurso s-ro Niŝibata klarigis Esperantajn alfabetojn per rusaj kirilaj literoj kaj facilajn Esperantajn frazojn. Aldone mi disdonis al kelkaj homoj la flugfoliojn pri la gazeto de Hokkajda indiĝeno "Ainutimes".

http://www.hokkajda-esp-ligo.jp/jp/sahxaleno/sahxaleno_esp.htm

(Resumo de la prelego de s-ro Hoŝida - Esperanta versio)

(Anonco pri la gazeto de Hokkajda indiĝeno "Ainutimes" kaj Esperanto)

Kaj en la 12-a de aŭgusto ni venis al loka ĵurnalejo, kaj ni petis, ke membroj de la ĵurnalejo kolektu novaĵojn pri nia agado. Ili enmetis tion en siaj retaj ĵurnaloj.

<https://skr.su/news/262173>

Mi pasigis alt-kvalitajn tagojn.

Retejo:

http://www.hokkajda-esp-ligo.jp/jp/sahxaleno/Raporto_de_vojagho_por_disvastigi_Esperanton_en_Sahhaleno.pdf

